

Heinrich Heine,  
La Sileziaj teksistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe siaj teksiloj la dentojn  
grincante  
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:  
Ni teksas trioblan malbenon  
por vi  
En vian morttukon, Malnov-Germani'.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, al kiu pro  
nia  
Mizero ni preĝis en kredo  
pia;  
Ja vane esperis, atendis ni,  
Nin mistifikis kaj trompis Li.  
Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi reĝ' de l'  
riĉuloj,  
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,  
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn  
el ni,  
Kiel hundojn nin pafmortigigas li.  
Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,  
Kie nur prosperas la koterio,  
Kie estas rompata ĉiu juna  
flor',<sup>3</sup>  
Kie regas de l' putro la odor'  
-  
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,  
La ruĝaj teksistoj

*tradukita de Emil Pfeffer*

En senlarma okul' kaŝante la  
sentojn,  
Ili sidas kaj teksas kaj grincas  
la dentojn:  
Malnova mond'! Ni teksas en  
pen'  
Morttukon al vi kun triobla  
malben' -  
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al diaĵo, al kiu kun  
preĝo  
Turniĝis en frostoj, malsato kaj  
neĝo  
Ni kaj atendadis en vana esper'  
...  
Ĝi mokis kaj ridis je nia mizer'  
-  
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al la reĝo, la reĝo de  
riĉaj,  
Senkora vampiro por ni malferliĉaj,  
Senigis li nin de la lasta mon',  
Nun oni nin pafas laŭ lia ordon'  
-  
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al falsa la patrolando,  
Kie regas tiaj vampiroj en bando,  
Elsuĉas vivsukojn el ĉiu junflor',  
Protekt' nur por vermoj, putraj',  
malhonor' -  
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,  
Die schlesischen Weber

Im düstern Auge keine Träne  
Sie sitzen am Webstuhl und fletschen die Zähne:  
Deutschland, wir weben dein Leichentuch,  
Wir weben hinein den dreifachen Fluch -  
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem Gotte, zu dem wir gebeten  
In Winterskälte und Hungersnöten;  
Wir haben vergebens gehofft und geharrt,  
Er hat uns geäfft, gefoppt und genarrt -  
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem König, dem König der Reichen,  
Den unser Elend nicht konnte erweichen,  
Der den letzten Groschen von uns erpreßt  
Und uns wie Hunde erschossen läßt -  
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem falschen Vaterlande,  
Wo nur gedeihen Schmach und Schande,  
Wo jede Blume früh geknickt,  
Wo Fäulnis und Moder den Wurm erquickt -  
Wir weben, wir weben!

...

<sup>3</sup>Kie frue rompatas ĉiu flor',

Navedo flugas kaj krakas teksil',	Kaj krakas teksilo kaj flugas ŝipet',	Das Schiffchen fliegt, der Web- stuhl kracht,
Ni teksas senlace dum nokta trankvil' –	Ni teksas sen ĉes', kun la mort' pro l' vet' ...	Wir weben emsig Tag und Nacht –
Morttukon ni teksas, Ger- manujo, por vi, <sup>4</sup>	Malnova mond'! Ni teksas en pen'	Altdeutschland, wir weben dein Leichentuch,
Entekas trioblan malbenon ni,	Morttukon al vi kun triobla malben' –	Wir weben hinein den dreifachen Fluch,
Ni teksas, ni teksas.	Ni teksas, ni teksas!	Wir weben, wir weben!

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05-31.*

*MR-347-2-1 / Arg-240-489 (2004-06-02 11:46:37)*

*Esperantigo laŭ la dua germanalingva teksto, kiu estis – kun la rimarkigo “de la poeto reviziita” – eldonita en 1846 de H. Püttmann en la volumo “Album. Originalpoesien” (= “Albumo. Originaj poeziaĵoj”). [Laŭ interreta informo de l' 27.05.2004 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf; s-ino Marianne Tilch.]*

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de EMIL PFEFFER (\*1891-12-16 – †1965-11-20) en 1929.*

*Arg-240-481 (2004-05-24 22:44:39)*

*La traduko de Emil Pfeffer aperis en la sveda revuo “Svenska Arbetar-Esperantisten” (= “La sveda laborista Esperantisto”, en la septembra-oktobra numero de 1929, sur paĝo 83. Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiujn informojn kaj la tradukon de Emil Pfeffer en la libro “Verkoj de Heinrich Heine” de Adolf Holzhaus, eldonita en 1973 de la “Esperanto-Ligo en Israelo”.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1846.*

*Arg-240-479 (2004-06-02 11:33:30)*

*Ursprünglicher deutschsprachiger Text der zweiten Fassung des Gedichtes, die im Jahr 1846 von H. Püttmann in der Gedichtsammlung „Album. Originalpoesien“ – mit dem Vermerk „vom Dichter revidiert“ – herausgegeben worden ist. [Laut Netznachricht vom 27.05.04 des Heinrich-Heine-Instituts Düsseldorf, Frau Marianne Tilch.]*

<sup>4</sup>Morttukon, ni teksas por vi, Germani',  
Trioblan malbenon entekas ni.